# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-08 n-ro 379

## Trump agnoskis Jerusalemon kiel ĉefurbon de Israelo



En 2017 sep landoj aktive persekutis nekredantojn

UN finis median asembleon kun promesoj fini poluon

Suda-Suda Forumo pri Homaj Rajtoj malfermiĝis en Pekino

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

En 2017 sep landoj aktive persekutis nekredantojn
*«The Freedom of Thought Report» [Raporto pri penslibereco] p. 03*

UN finis median asembleon kun promesoj fini poluon
*La gvidantoj promesis fini la poluadon kaj subteni remedojn por pura medio p. 04*

TRUMP agnoskis Jerusalemon kiel ĉefurbon de Israelo
*TRUMP diris, ke lia anonco estas nur rekono de la realaĵo p. 05*

Suda-Suda Forumo pri Homaj Rajtoj malfermiĝis en Pekino
*Pli ol 70 landoj kaj internaciaj organizoj p. 05*

La lando de la ŝvitbanejoj deklaris sian sendependecon antaŭ 100 jaroj
*Tradicia nacia manio p. 06*

Hodiaŭe
*Bjørnstjerne BJØRNSON; kaj HORACIO p. 06*

# En 2017 sep landoj aktive persekutis nekredantojn

Tion ĉi emfazas la nova raporto «*The Freedom of Thought Report*» [Raporto pri penslibereco] de la *Internacia Humanista kaj Etika Unio* (IHEU) prezentita ĉi-marde la 5-an de decembro ĉe la Eŭropa Parlamento en Bruselo.




La ekzisto kaj pligravigo de la aktivaj persekutoj konfirmiĝas en sep landoj: Barato, Malajzio, Maŭritanio, Pakistano, Sauda Arabio kaj Sudano.

85 ŝtatoj diskriminacias grave kaj sisteme la nekredantojn.

La IHEU kondamnas la nepunitecon de kelkaj publikaj aŭtoritatoj koncerne la murdojn kaj/aŭ persekutojn kontraŭ nekredantoj.

**Forlasi aŭ ŝanĝi religion plu estas submetita al mortopuno en 12 landoj**

La raporto 2017 pri penslibereco atentigas pri la murdoj plenumitaj kontraŭ nekredantoj (ateistoj, agnostikuloj, indiferentuloj, skeptikuloj…) en Pakistano, Maldivoj kaj Barato, dum la lastaj dekdu monatoj. En Malajzio, la registaro mem kuraĝigis la perfortojn, minacante la apostatojn pri ĉaspersekutado. En Pakistano, post kampanjo kondukita kontraŭ la ateistoj, pluraj aktivuloj malaperis, aŭ estis persekutitaj pro supozaj blasfemoj. Nuntempe, du personoj plu atendas mortopunon. Kazoj de apostateco en Maŭritanio, Sauda Arabio, kaj Sudano estas substrekitaj kiel ekzemploj de pli ĝeneralaj minacoj kontraŭ tiuj, kiuj sin deklaras nekredantoj, kaj kiuj defias la strukturojn de la religia potenco, aparte en kelkaj islamaj landoj, kie apostateco estas krimigita. La raporto informas ankaŭ pri la fakto, ke forlasi aŭ ŝanĝi religion plu estas submetita al mortopuno en 12 landoj.

Murdo kaj aliaj kazoj de persekutoj plenumataj kontraŭ ateistoj, partoprenas al nerefutebla mondskala malprogreso de la rajtoj por la nekredantoj.

Laŭ la raporto de la IHEU, tiuj incidentoj konsistigas la plej videblajn elementojn de vasta movado de mondskala diskriminacio kontraŭ la nekredantoj. Entute, elementoj de grava diskriminacio estas listigitaj en 55 ŝtatoj. Interalie, tiuj aranĝoj inkluzivas la leĝojn, kiuj punas «blasfemon» per mallibereco, kaj ankaŭ la fundamentisman prozelitismon en la publikaj lernejoj, influadon de la religia doktrino sur la publika leĝo aŭ la kontrolo de la familiaj kaj civilaj aferoj fare de la religiaj tribunaloj.

La raporto atentigas pri la fakto, ke la murdoj (pli kaj li multnombraj) kaj aliaj kazoj de persekutoj plenumitaj kontraŭ ateistoj, ne estu rigardataj kiel izolitaj eventoj. Tute male, ili partoprenas en nerefutebla «tendenco de tutmonda malkresko de la rajtoj por la nekredantoj».

Laŭ la prezidanto de la IHEU, brito Andrew Copson, ««pli kaj pli da personoj el Sauda Arabio, Afganio aŭ Pakistano kontaktas nian organizaĵon kaj la humanisman movadon por diri: «Mi estas humanisto» aŭ «Mi estas ateisto, sed mi ne povas deklari min tiel, eĉ en Interreto. Ili timas atakon, eĉ murdon pro tio»».

Andrew Copson insistas: «Tiu raporto demonstras, ke tiu timo ne estas malracia. Eksterleĝaj murdoj

okazas en pluraj landoj, kaj preskaŭ ĉiam la murdistoj profitas nepunitecon. La internacia komunumo ne povas silenti plu, fronte al la ŝtatoj, kiuj krimigas forlason de la religio, kaj punas ĝin per morto. Ni petas de la internacia komunumo, ke ĝi kondamnu per la plej granda firmeco la persekutojn kontraŭ la nekredantoj, kaj ke ĝi laboru kun la defendantoj de la homaj rajtoj en la tuta mondo, por ĉesigi tiun maljustecon. Ni ankaŭ petas subtenon de nia kampanjo de monkolekto «humanistoj en danĝero», ke la IHEU povu daŭrigi sian necesan laboron favore al la nekredantoj en la mondo»

Neniam Milito Inter Ni

# UN finis median asembleon kun promesoj fini poluon

La 3-a sesio de la Media Asembleo de la UN finiĝis merkrede [06 dec 2017] en Najrobio, kaj la gvidantoj promesis fini la poluadon kaj subteni remedojn por pura medio.



Pli ol 4 000 ŝtatestroj, ministroj, komercaj gvidantoj, oficialuloj de UN, reprezentantoj de civilaj societoj, aktivuloj kaj famuloj, kiuj ĉeestis la 3-tagan kunvenon, konsentis pri serio da rezolucioj kaj promesis plibonigi la vivon de miliardoj da homoj en la tuta mondo per purigo de aero, tero kaj akvo.

Edgar GUTIERREZ-ESPELETA, baldaŭ eksiĝonta prezidanto de la Media Asembleo de UN, diris en la ferma ceremonio, ke ajna minaco al la medio, sano, ekonomio, sekureco, bonfarto kaj ekzistado de la homaro devas esti haltigita tuj. Li aldonis, "Kun la promesoj faritaj ĉi tie, ni sendas fortan mesaĝon, ke ni aŭskultos la sciencon, ŝanĝos la manieron de konsumado kaj produktado kaj traktos ĉian poluon en la tuta mondo".

La asembleo rimarkigis, ke traktado de poluado ebligos al ĉiuj landoj kontribui al daŭripova evoluado per batalo kontraŭ malriĉeco, plibonigo de sano, kreado de laborpostenoj kaj redukto de la emisiado de forcejaj gasoj. Ili ankaŭ esprimis promeson kunlabori kun politikistoj, sciencistoj, la privata sektoro kaj la civila socio por fari la planedon senpolua.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Trump agnoskis Jerusalemon kiel ĉefurbon de Israelo

Usona Prezidento Donald Trump merkrede [06 dec 2017] anoncis sian oficialan agnoskon de Jerusalemo kiel ĉefurbo de Israelo, kaj instrukciis la Ministerion pri Eksterlandaj Aferoj komenci la procezon movi la usonan ambasadorejon el Tel-Avivo al Jerusalemo.



Trump diris, ke estas tempo por oficiale agnoski Jerusalemon kiel ĉefurbon de Israelo, kaj li opinias, ke ĉi tiu agado estas por la plej grandaj interesoj de Usono kaj serĉas pacon inter Israelo kaj Palestino. Tio estas longe atendita paŝo por akceli la pacan procezon kaj atingi longdaŭran interkonsenton. Trump diris, ke lia anonco estas nur rekono de la realaĵo, kaj ne intencis reflekti forlason de la usona devontigo al longdaŭra pacinterkonsento aceptabla al ambaŭ flankoj de Israelo kaj Palestino.

Antaŭe, la palestinaj aŭtoritatoj ripetis sian starpunkton, ke ne estos suverena ŝtato de Palestino sen Orient-Jerusalemo kiel ĝia ĉefurbo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Suda-Suda Forumo pri Homaj Rajtoj malfermiĝis en Pekino

Ĵaŭde [07 dec 2017] en Pekino malfermiĝis la 1-a Suda-Suda Forumo pri Homaj Rajtoj, sub la aŭspicioj de la Informa Oficejo de la Ŝtata Konsilio kaj la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj. Ĝin ĉeestas ĉirkaŭ 300 oficialuloj kaj kleruloj el pli ol 70 landoj kaj internaciaj organizoj.




Ĉina prezidanto Xi Jinping [ɕǐ tɕìn.pʰǐŋ 习近平 ] sendis grantulan mesaĝon al la forumo. Li alvokis la internacian komunumon respekti kaj pripensi la volon de la popoloj de evoluantaj landoj en la disvolvado de homaj rajtoj. Li diris, ke homaj rajtoj devas kaj povas esti antaŭenigataj nur laŭ specifaj naciaj kondiĉoj kaj popolaj bezonoj.


Surinama Ministro pri Eksterlandaj Aferoj Yldiz Deborah Pollack-Beighle diris en la inaŭguro, ke la forumo liveras al la Suda-suda kunlaboro bonan ŝancon, kaj evoluantaj landoj povas esprimi per tiu ĉi platformo siajn proprajn opiniojn kaj zorgojn en ĉiuj kampoj koncernaj homajn rajtojn por antaŭenigi la kunlaboron.

Saad Alfaragi, speciala raportanto pri disvolvaj rajtoj el la Homrajta Konsilio de la UN, diris, ke la Suda-suda kunlaboro prezentas vastan perspektivon en la kampo de disvolvado, kaj li atendas, ke ĉiuj partioj de la forumo atingos vastan konsenton.

Yu
Ĉina Radio Internacia

## La lando de la ŝvitbanejoj deklaris sian sendependecon antaŭ 100 jaroj

Finnlando deklaris sin sendependa la 6-an de decembro 1917, post la oktobra revolucio en Ruslando, kaj ricevis sendependecon per dekreto de la bolŝevista registaro. Ĝis 1809 la lando estis parto de Svedlando, ekde tiam ĝis 1917 ĝi apartenis al la Rusia imperio, kiel memrega grandprinclando.



En tiu lando tradicia nacia manio estas: saŭnado.

Saŭno estas ŝvitbanejo laŭ finna maniero, kie troviĝas forno kun varmega ŝtonaro, sur kiun la verŝata akvo nebule vaporiĝas. En Finnlando la ŝvitbanejoj troviĝas eĉ en la laborejoj. Kun loĝantaro de 5,5 milionoj da homoj la lando havas ĉirkaŭ 2 milionojn da saŭnoj, 60% en domoj, la restaĵo en hoteloj, naĝejoj, ripozdomoj.

La finnaj ripozdomaj saŭnoj troviĝas borde de lagoj, estas apartaj dometoj hejtataj per betula ligno, kaj la urbaj per elektra kurento. La urba saŭno estas loketo en banejo, kovrita interne per ligna murkovraĵo.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

---



## Bjørnstjerne Bjørnson

**Bjørnstjerne Bjørnson (naskiĝis la 8-an de decembro 1832 en *Kvikne*, mortis la 26-an de aprilo 1910 en Parizo) estis norvega verkisto, poeto kaj sociodebatisto, kiu en la jaro 1903 gajnis la Nobel-premion pri literaturo.**

**En Esperanto aperis: *Elekto, Synnøve Solbakken: norvega rakonto; La kanto de Ingrid; Gaja knabo.***

**Vikipedio**

---

## Horacio



**Horacio aŭ pli ĝuste Quintus Horatius Flaccus (65-8 a. Kr.), estas kun Vergilio unu el la plej gravaj poetoj de Romo dum la epoko de Aŭgusto.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**